

Neniu sekso superas alian, ambaŭ samvaloras...

Togbe estas la estro de mezklasa familio. Li havas la rimedojn por provizi la bezonojn de sia tuta familio. Li estas bonega farmisto konata de la tuta vilaĝo Kondji. Li tute ne kuraĝigas la edukadon de siaj filinoj sed multe pli interesiĝas pri knaboj pro diversaj kialoj.

Por ĉi tiu viro, sendi knabinon al lernejo estas kiel ĵeti monon tra la fenestro aŭ kiel verŝi akvon sur la dorson de anaso. Laŭ li, tre ofte knabinoj en lernejo gravediĝas kaj finas sian vivon kun siaj edzoj. Togbe vidas en la edukado de siaj filinoj fonton dea monmalŝparado.

En lia familio de ok (08) infanoj, el kiuj estas kvin (05) knaboj kaj tri (03) knabinoj, Togbe ankoraŭ en sia filozofio sukcesas sendi siajn filojn al lernejo kaj petas al la knabinoj resti hejme por la endomaj taskoj ĝis li sukcesos trovi la geedzojn por ili.

Agossi, la plej juna el la knabinoj, kreskanta, ofte ĉagreniĝas kiam ŝi vidas siajn pli maljunajn fratinojn labori hejme ĉiutage. Ne akceptante vivi en la sama situacio kiel ŝiaj fratinoj, ŝi decidis forlasi siajn gepatrojn por iri al sia patrinflanka onklo en alia proksima vilaĝo kun la espero plenumi siajn revojn studi en la lernejo.

Por plenumi la atendojn de Agossi, lia onklo Bossou enskribis ŝin ĉe la vilaĝa publika lernejo. La tago de ŝia enskribiĝo Agossi estis feliĉa, ĉar ŝia unua celo estis atingita. Tre feliĉa, ŝi studis diligente kaj rapide rimarkiĝis per sia inteligento. Ĉiuj admiris ŝin en la lernejo. Post bazlernejo kaj mezlernejo, ŝi ricevis stipendion kaj sukcese finis universitatan lertigadon pri ĵurnalismo dum 3 jaroj. Kun sia diplomo en la mano, ŝi trovis laboron kiel ĵurnalisto ĉe la radio-stacio de sia urbo.

Hodiaŭ ŝia tuta vilaĝo, ŝiaj gepatroj aŭdas ŝian voĉon per la elsend-programoj, kiujn ŝi prezentas, kaj ŝi tiel fariĝis modelo de sukceso tra sia regiono.

Skribas Bernard Gnancadjab